## Deĉifru la signifon de la vortoj!

| A | B | C |
|---|---|---|
| 1. timulo | 1. senigi | 1. edziniĝi |
| 2. enbuŝigi | 2. dentaro | 2. ĉiesulino |
| 3. enkapigi | 3. dolĉaĵo | 3. kunigi |
| 4. altabligi | 4. seniĝi | 4. eksterigi |
| 5. manĝilaro | 5. preĝaro | 5. posteulo |
| 6. ĝiskape | 6. samideano | 6. beliĝi |
| 7. renovigi | 7. unuiĝi | 7. vidindaĵo |
| 8. laciĝi | 8. malĝojigi | 8. etigi |
| 9. ripozejo | 9. altabliĝi | 9. enpoŝigi |
| 10. resaniĝi | 10. malriĉulino | 10. estaĵo |
| 11. purigilo | 11. neniigi | 11. subakviĝi |
| 12. dormigilo | 12. turniĝi | 12. fariĝi |
| 13. bonŝanculo | 13. hontindaĵo | 13. pintigi |
| 14. surdomutulo | 14. konstruaĵo | 14. cedema |
| 15. frateco | 15. sableca | 15. nemanĝebla |
| 16. malligi | 16. ŝercemulo | 16. fosilo |
| 17. antaŭdiri | 17. senlaborulo | 17. ĉirkaŭrigardi |
| 18. bofratino | 18. ŝuistilaro | 18. ŝanĝiĝi |
| 19. eksilentigi | 19. klarigo | 19. malpleniĝo |
| 20. leviĝi | 20. intermiksiĝi | 20. memkompreneble |
| 21. gastigema | 21. malrapidigi | 21. mallertulo |
| 22. kompatindulino | 22. dekstrulo | 22. dispeciĝi |
| 23. maltrankviliĝi | 23. fermiĝi | 23. estiĝi |
| 24. senvestigi | 24. havigi | 24. elĉerpiĝi |
| 25. kreaĵo | 25. kunpuŝiĝi | 25. nervozigi |
| 26. blankulino | 26. arbidaro | 26. ĉevalejo |
| 27. cindrigejo | 27. drinkemulo | 27. bovaro |
| 28. surtabligi | 28. kulpigi | 28. farendaĵoj |
| 29. devigi | 29. eksedziĝi | 29. miskomprenebla |
| 30. blindige | 30. korvarmige | 30. ofendiĝema |
| 31. aŭdiĝi | 31. grupigi | 31. ebriiga |
| 32. komenciĝi | 32. finiĝi | 32. montriĝi |
| 33. evidentiĝi | 33. sendigi | 33. kunkuŝiĝi |
| 34. returniĝi | 34. okupiĝi | 34. necerteco |
| 35. senkapigo | 35. ŝtonera | 35. enstomakigi |
| 36. aĉulino | 36. senvalidigilo | 36. bovinetejo |
| 37. retronombrilo | 37. tranĉilakrigisto | 37. bovinejeto |
| 38. resanigilo | 38. malheliĝo | 38. senkolorigado |
| 39. forĵetindaĵoj | 39. gekontraŭuloj | 39. gesamseksemuloj |
| 40. frizistilarejo | 40. nemalhaveblaĵoj | 40. eksmalsanulejestrino |

## Konsiloj por la uzo

Ĝenerale la deĉifrado de la derivitaj vortoj estas logika ludo por la lernantoj. Antaŭ ol ili lernas mem krei la vortojn lernu trovi la signifon de tiaj vortoj.
La supra tabelo estas aranĝita tiel ke la kolumnoj havas literojn kaj la linioj ciferojn.
Je kiu ajn nivelo ni povas disdoni la foliojn kaj peti al la lernantoj ke ili serĉu vortojn en la tabelo, kies signifon ili komprenas. Por indiki pri kiu vorto ili parolas, ili devas diri la koordinatojn de la vorto. /Bona ekzerco ankaŭ al la aktiva kaj pasiva uzo de la numeraloj. /
La lernantoj vole-nevole trairas plurfoje la vortoliston, tre rapide devas aktivigi siajn konojn por trovi plene komprenitan vorton kaj kompreneble ofte haltas la okuloj ĉe vortoj kies signifon ili jam malkovris, tiu ofta ripetado helpas la memorigan procezon.
La solvado de la signifo povas okazi duvoje:

a) Ili diras la gepatralingvan tradukon de la vorto.
b) Ili provas ĉirkaŭskribi la signifon de la vorto, laŭeble ne uzante la vorton mem. Tiu ekzercoformo povas veni post la antaŭa varianto, kiam la lernantoj jam pli-malpli konas la enhavon de la tabelo. Kompreninte la vortdifinon, la aliaj lernantoj povas diri la koordinatojn de la koncerna vorto.

Estas tre bone malfaciligi la ekzercon tiel, ke la lernantoj devu diri tutan frazon kun la derivita vorto.
Oni ne devas je unu spiro solvi ĉiujn vortojn, la folion plurfoje eblas preni kaj pasigi 5-8 minutojn por tiu deĉifro-ludo.